*Aperis en: GrKG/H 45/2, junio 2004, p. 90/91*

**Protokoko de la 52a senatkunsido** (la 46a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, 55a post la fakta eklaboro) okazinta en Freising la 12an kaj 13an de junio 2004.

*1 Formalaĵoj*

Ĉeestas ĉiuj kvin senatanoj, krome OProf. Eva Poláková kiel vicsenatano. La Senato estas kvoruma; neniu kontraŭas la ĉeeston de EProf. Leonov kiel gasto.

*2 Statutŝanĝoj*

AIS-IAW. La senato aprobas la ideon, ke AIS enkorpiĝu ankaŭ en la germana asocio AIS-IAW. Por identigi la organojn de AIS kun ties respondaĵoj en AIS-IAW, la senato favoras ŝanĝon en la statuto de AIS-IAW, laŭ kiu ĉiuj efektivaj kaj subtenaj membroj de AIS estu membroj de AIS-IAW. Tia propono estos prezentata al la samtaga kunveno de AIS-IAW.

*3 Alvokoj.*

ADoc. Ana Vrajitoru estu AProf. pri lingvistiko en sekcio 2. ADoc. Broczkó P'eter estu AProf. pri informadiko en sekcio 1.

*4 SUS-Programo.*

La SUS-kursoj okazu en kvar blokoj:
A: Angstl, Pennacchietti,Quednau
B: Frank / Konnerth, Lobin / Lewanderska, Maitzen, Vrajitoru
C: Korĵenevskaja-Gouriou, Lechowski, Lobin / Leonov, Poláková.
D: Frank, liberaj kaj projekt-akceptigaj prelegoj
La plejparto de la programo okazu en la AIS-ejoj, strato Župná 1 (ĉe la Eŭropa Placo) en Komárno. Pri detaloj interkonsentu OProf. Fössmeier, Frank kaj Poláková.

*5 Legitimado de LEUKAIS-organoj.*

La fondo-rektoraro de la „Libera Eŭropia Universitato de AIS“ (LEUKAIS) konsistu el OProf. Frank, Poláková kaj Selten. Provizora kanceliero estu Poláková. Fakultatestroj de la tri daŭraj fakultatoj estu: Por fakultato 1, en kiu AIS enkorpiĝas, laŭstatute la prezidanto de AIS (viculo estas la vicprezidanto); por fakultato 2: Poláková (viculo difinota) kaj por fakultato 3 Pennacchietti (viculo Barandovská-Frank).
La senato aprobas la celon, kadre de LEUKAIS evoluigi kiel unu el la estontaj laŭbezonaj fakultatoj fakultaton pri establiĝinta kaj alternativa medicino. Pri ties evoluigo estas komisiitaj OProf. Sachs kaj Asci Sebők Zsoltan mudr. La evoluigo komenciĝu en la kadro de la Scienc-aplika (Teknika-Praktika) Sektoro de AIS.

*6 Statutoj de la Arta kaj Scienc-Aplika Sektoroj.*

Analogaj proponoj estos prezentataj al la Ĝenerala Asembleo dum SUS 27. La statutoj aperu en la AIS-libro, same la statutoj de la institucioj, en kiuj AIS enkorpiĝas.

*7 Finplenumo de taskoj de la antaŭa Senato*

a) Ekzamenaktoj: Estis transdonitaj nur la aktoj de unu studento; transdono de tri pliaj estas anoncita. La resto mankas.
b) La komputilo kaj presilo aĉetitaj por la antaŭa Senata Sekretario estu venditaj kun konsidero de ilia amortizita valoro.
c) La finkalkulo de SUS 26 alvenis ĉe la trezoristo.

*8 Procesoj*

a) Impostofico Paderborn: La proceso povos okazi verŝajne maljam en 2005. Plue reprezentas AIS-on la prezidanto kun la trezoristo.
b) ASci Piotrowski: Ĉiuj aktoj iru ek de nun al la trezoristo, kiu reprezentos AIS-on.
c) Eksa Senata Sekretario: La proceso ŝvebu ĝis decido en Komárno.

*9 Investoj en Komárno kaj aliloke; buĝeto 2004.*

Por renovigo (okazonta antaŭ SUS 27) de la akiritaj kvin domoj en Komárno, Župná 1, € 25.000 estas enbuĝetigitaj, kromaj € 10.000 ĝis maks. € 15.000 estu disponigataj por moveblaj instalaĵoj.

*10 Eksigoj.*

La trezoristo kompilu liston de la obstinaj nepagintoj kun stato de ĉ. 2004-07-25; laŭ tiu listo la nepagintoj estos eksigitaj.

*11 Konsisto de la senataj oficoj (direktoro, vicdirektoro; kunlaborantoj):*

Identec-/honoradofico: Frank, Pennacchietti / Maitzen; Barandovska, Fössmeier.
Ekzamen-/klerigofico: Quednau, Poláková; Fössmeier, Konnerth-Reisenauer, Vlad.
Inform-/protokolofico: Fössmeier, Maitzen; Poláková.
Financofico: Wickström, Poláková; Konnerth-Reisenauer.
Sciencofico: Minnaja, Holdgrün.

*12 Diversaĵoj.*

Nenio kroma estas pritraktenda.

Karlovo, 2003-09-20 R. Fössmeier, protokolofico